# *Usona kongreso dividita pri armilvendoj al Israelo*




Va?ingtono, maj 20 (RHK) La sendependa usona senatano Bernie Sanders prezentos rezolucion por bloki la vendon de misiloj al Israelo kontra? 735 milionoj da dolaroj, afero kiu instigas fortajn dividojn en la Kongreso.

"En tempo, kiam bomboj  fabrikitaj en Usono detruas Gazaon kaj mortigas virinojn kaj infanojn, ni ne povas simple permesi ke alia granda armila transakcio okazu sen e? debato en la Kapitola Monteto," Sanders diris en deklaro akirita de The Hill.

"Mi kredas, ke Usono devas helpi malfermi la vojon al paca kaj prospera estonteco por israelanoj kaj palestinanoj, ni devas atente analizi ?u la vendo de ?i tiuj militaj ekipa?oj vere helpas atingi ?i tion, a? se ?i simple nutras la konflikton," aldonis la eksa kandidato al  prezidanteco.

La? The Washington Post, la rezolucio nur postulas simplan plimulton por esti aprobita de la Senato, sed ?i bezonus la subtenon de du trionoj de le?donantoj kaj en tiu le?dona korpo kaj en la ?ambro de Reprezentantoj se ?i estos vetoita de la prezidento Joe Biden.

Kun simila celo, demokrataj kongresanoj Alexandria Ocasio-Cortez, Mark Pocan kaj Rashida Tlaib prezentis rezolucion en la Malsupra ?ambro merkrede kun la celo bloki la vendon de komunaj rektaj

atakaj municioj kaj malgrand-diametraj bomboj al Israelo.

"Dum jardekoj Usono vendis miliardojn da dolaroj en armiloj al Israelo sen e? devigi ilin respekti la bazajn rajtojn de la palestinanoj, kaj per tio ni rekte kontribuas al la morto, deloki?o kaj senrajtigo de milionoj da homoj." Ocasio- Cortez diris en deklaro.

Tamen la rezolucio anka? estas konsiderata plejparte simbola, ?ar ?i ne atendas esti aprobita de demokrataj gvidantoj favoraj al la vendo de la misiloj al la registaro de Benjamin Netanyahu, des malpli respublikanoj.
La? la ?urnalo The Hill, ?i tiu propono substrekas la kreskantajn dividojn inter demokratoj dum la israelaj atakoj kontra? Gazao da?ras.

Aliflanke, prezidento Biden diris al Netanyahu merkrede, ke li atendas "signifan malpliigon" de perforto inter Israelo kaj Hamas por meti la konflikton, kiu estas en sia dua semajno, sur la vojon al batalhalto.

Post la telefonvoko, la ?efministro deklaris, ke li estas "decidita da?rigi ?i tiun operacion ?is ?i atingos la celon", post kio hiera? vespere la israela milita komando pliigis la raketajn atakojn kontra? Gazao.

La registaro de Biden sciigis la Kongreson la 5-an de majo, ke ?i aprobis la vendon al Israelo, sed la plej multaj el tiuj transakcioj postulas 30-tagan Kongresan revizion, kvankam iuj usonaj aliancanoj, inkluzive Israelo, ricevas periodon de du semajnoj.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/257971-usona-kongreso-dividita-pri-armilvendoj-al-israelo

**Radio Habana Cuba**